9-a JARO, N-o 399



LEIPZIG, 29./12. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerhner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

ĈU NACIA AŬ SOCIA EGALRAJTECO?

Letero el Jugoslavio.

Estas malpermesite ĉi tie diri ion pri la nuna politika situacio, k precipe diri la veron. Farante tion oni riskas sian liberon; arestoj k persekutoj minacas, oni akuzas vin pri aktiva komunisteco. Ho ve! al la malfeliĉulo, kiu devas suferi la plej diversspecajn neimageblajn torturojn, kiuj ofte (precipe dum la lastaj jaroj) sekvigas la morton. Sed malgraŭ tia besteca subpremado ekzistas ankoraŭ sinceraj k veron dirantaj homoj, precipe inter la proletaro.

La fundamenta problemo por proletaro k duonproletaro estas ĝia *socia* subpremiĝo. Depost jaroj la laboristoj vegetadas kun nesufiĉaj salajroj, en ĉifonitaj vestoj. Laŭ la statistikoj el pluraj jaroj la meznombra salajro estas 25 dinaroj (1.50 mk. germ. aŭ 0.36 dol.) tage. Kiel laboristo vestu sin, se malbonkvalita kompleto kostas 1000, bonkvalita 2000 dinarojn!

Kaj nuntempe la tutan ekonomion, bankojn, industrion k metiistojn premas la krizo. Pri nova laboro aŭ ekonomia reviviĝo oni ne pensu. La bankroto de kelkaj bankoj, la ĉeso de l'germanaj riparpagoj k la perforta deflacio de l' dinaro elĉerpis la lastajn fortojn de l' lando, plifortigis la retenon de l' mono k haltigis la konstru-industrion, kiu antaŭ unu jaro ankoraŭ estis tre vigla.

Plej malbone fartas la kamparanoj. Iliaj produktoj ne plu vendiĝas. Pro la primitiva terkulturado ili ricevas tre malmulte da profito, k jam depost jaroj amasiĝas la ŝuldoj, farataj por pagi impostegojn. La kamparanaro konsistigas 85% el la loĝantaro. Dum duona jaro kamparano enspezas ne eĉ tiom, por povi aĉeti kompleton. Antaŭmilite li povis per vendo de bovino aĉeti vestaĵon k ŝuojn por si k kvinpersona familio k pagi la impostojn. Hodiaŭ li povas nek la unu nek la alian, ne nur tial ke li ricevas malpli por bovino (proksim. 1000 din.), sed ĉar la impostoj estas multe pli altaj k la industriproduktoj plikariĝis. La granda falo de l' kamparana aĉetpovo igas nesolvebla la krizon por la grandkapitalistoj k militistoj, kiuj regas la landon. La impostegoj devas plejparte esti pagataj de la kamparanoj k laboristoj; ili estas elspezataj por la soldataro, la polico, la ĝendarmoj k la ŝtatadministracia burokrataro. La novaj internaciaj komercrilatoj endanĝerigas la trafikon kun eksterlando, kiu jam falis de 30 al 4,5 miliardoj da dinaroj.

Kvankam la sociaj problemoj devus esti la plej gravaj, la laboristaron k kamparanaron okupas unuavice la batalo pri *nacia egalrajteco!* Esenca estas la kontrasto inter la malnov-serba teritorio k la kroataj k slovenaj regionoj, kiuj konsentis en 1918 post likvidiĝo de l' Habsburga monarkio al la „libera kuniĝo" kun la malnova Serbio. Kroatio k Slovenio estas sufiĉe industriigitaj, dum en Serbio la agrikulturo, eĉ tre primitiva agrikulturo, superregas. Krom tio – tre grave – ankaŭ laŭreligie la slavoj estas dividitaj: la Nordbalkano estas katolika, la suda ortodoksa, t. e. grekrite aŭ rusrite kristana. La nordanoj uzas latinan, la sudanoj kirilan skribon, dum la lingvoj kroata k serba estas tute samaj, nur plej sudoriente k plej norde la diferenco pligraviĝas. Dum la sudorienta Balkano ekonomie malprogresis, ĉar ĝi estis dum la lastaj 60 jaroj, post la liberiĝo de Bulgario el sub turka jugo, kelkfoje milit-teritorio, la norda parto estis indulgata de militaj teruraĵoj jam depost ducent jaroj. Ankaŭ intelekte la nordanoj estas superaj al la sudorientanoj; sekve, logike, devus regi Jugoslavion la intelekte pli fortaj nordanoj, speciale pro tio, ke la bulgaroj havas propran ŝtaton k la serboj estas en pli ol 50%-a malplimulto en Jugoslavio.

Se en 1918, post malapero de l' Habsburga monarkio, estus malaperinta ankaŭ la Koburga dinastio en Bulgario, kiel rezulto ankaŭ la bulgaroj estus unuigitaj en Jugoslavio, k la unuiĝo ricevus federacian karakteron, ne nur por la bulgaroj, sed ankaŭ por kroatoj k slovenoj. Sed – filo de Koburgano sukcesis konservi sian tronon k memstaran bulgaran ŝtaton. Kaj kroatoj k slovenoj unuiĝis plene, rezignante iun karakteron de memstareco, dum Serbio aneksis parton de Bulgario k Makedonio, tiel kreante novan malamikecon inter si k Bulgario.

Dum 1928 kroatoj sub gvido de Stepan Radiĉ postulis memstarecon en federacia formo. Sed Radiĉ estis pafmortigata kun aliaj delegitoj en la parlamentejo. La posteuloj de Radiĉ ne plu riskis decidan batalon, sed kontentiĝis per pasiva rezisto kontraŭ ŝtata administracio k parlamento.

En 1929 la monarko deklaris la diktatorecon, en 1931 tamen enkondukis duon-konstitucian sistemon per parlament-elektoj, laŭ tiu formo, ke povas esti kandidato nur tiu, kiu akceptas la programon de la reĝa registaro. Eĉ tiu sola partio, por kiu oni rajtis elekti en novembro 1931, ne ekzistas reale; eĉ post forpaso de unu jaro ĝi ne estas konsistigita, kvankam laŭleĝe ĝi devus funkcii depost marto 1932 en la tuta lando. Dank' al tio ĉiuj gravaj postenoj, precipe en la armea administracio, estas okupitaj de serboj. Kirila skribmaniero estas ĉie enkondukita. La politika teroro regas pli terure ol iam.

La unua viktimo estis la komunista partio, kiu perdis centojn da batalantoj post la eksterleĝigo. Poste la kroata movado estis samniveligata kun la komunista k persekutata, ja ankaŭ la komunistoj pledis por federismo. La proletaro de Jugoslavio estas sur flanko de l' federistoj k defendis samtempe la rajtojn de l' naciaj malplimultoj. Tamen la proletaro subtenas neleĝan partion homogenan tra la tuta lando, montrante tiel, ke ĝi kredas al la eblo solvi la socian k nacian demandon per tiu ĉi partio. Ankaŭ ekzistas laŭnombre malforta socialdemokrata partio, kiu malatentas la nacian demandon k komplezas enordiĝi en la nuna reĝimo, kiel en la antaŭaj. Tiu reĝimo garantias la regadon de l'soc. partianoj en la leĝaj sindikatoj k asekurkasoj. La socialistaj sindikatoj havas apenaŭ 35 mil membrojn, la faŝistaj nur 6–7000. Sume ekzistas 1 miliono da laboristoj. La maldekstraj sindikatoj havis – antaŭ ilia malpermeso laŭ la „statdefenda" leĝo – 120 mil anojn k en la periodo, kiam ili denove rajtis ekzisti: en 1924–28, proks. 45 mil. Hodiaŭ do ne eĉ 5% el la laboristaro estas sindikate organizitaj.

Al la „asekur-kasoj", laŭdataj de l' socialdemokrataj burokratoj, ŝuldas la labordonantoj de hodiaŭ ankoraŭ okupataj 560 mil laboristoj 170 milionojn da dinaroj; la duono el tiu sumo estas konsiderata kiel perdita k neenkasigebla. La pasivoj de l' kasoj jam sumiĝas je 70 milionoj. * * *

La finbatalo estos batalata inter Romo k la anarkismo.

Ferdinando Domela Nivenhuis (Nieuwenhuis), 1846—1919

La signifo de figuro kiel Domela Nivenhuis kuŝas en lia propra evoluo; el kristano li fariĝis anarkisto, el aŭtoritata – liberana socialisto, el liberalulo – revoluciulo; due en lia granda valoro por la socialista movado. Domela Nivenhuis naskiĝis la 31-an de decembro 1846 en Amsterdamo. Lia familio estis tre riĉa k burĝa. Liaj avo k patro estis predikistoj. Jam dum la studado komenciĝis la dubo, dubo pri la fabeloj bibliaj, dubo pri la di-ekzisto. Tamen li ekzameniĝis k en 1879 li fariĝis predikisto. Iom post iom li tamen konstatis, ke multo mankas en la vivo precipe de la laboristoj, li vidis la skavecon, en kiu ili vivas k komprenis la rolon, kiun la eklezioj ludas en ĉi tiu klasa socio. Finfine li decidis forlasi la preĝejon k ĵetis sin en la laboristan movadon. En la lasta prediko li diris: „Por mi ne estas la ĉefafero esti kristano, sed esti homo." En unu el siaj unuaj artikoloj li skribis: „Mi venis en la laboristan movadon, kiel, mi ne scias; mi laboris en ĝi, antaŭ ol mi konsciis, mi ne serĉis ĝin, la cirkonstancoj gvidis min."

Tiam komenciĝis la longa, malfacila propagando, instiganta la amason batali kontraŭ la kapitalismo, por la socialismo. Li travojaĝis la tutan landon, li ne interrompis ĉi tiun propagandon; ĝis la morto li restis la vigla, senlaca propagandisto. Ĉirkaŭ li formiĝis organizo, kiu aperigis gazeton „Rajto por Ĉiuj", kies redaktoro li estis. Tiutempe li estis adepto de Marks. Elektita kiel parlamentano, li jam baldaŭ rimarkis, ke laŭ ĉi tiu maniero (la parlamentismo) la laboristoj neniam liberiĝos. Tiutempe li verkis broŝuron pri la senlaboreco, k jam tiam li antaŭdiris la venontan daŭran senlaborecon. En tiu broŝuro li skribis: „La kapitalisma salajrosistemo nepre havas senlaborulojn, do for la salajrosistemo! En la kapitalisma produktosistemo la laboristoj estas malriĉaj k mizeraj. Do for ĉi tiu sistemo! Plue li defendis la pren- k manĝrajton. Pli k pli Domela Nivenhuis komprenis, ke nur la individua libero garantias pli bonan sociordon. La konflikto kun la marksismo komenciĝis k en 1898 li konfesis sin anarkisto. En tiu tempo li estis kondamnata je unujara mallibereja puno pro artikolo skribita en „Rajto por Ĉiuj", kiu estis ofenda por la reĝa familio. Mem li ne skribis la artikolon, sed kiel respondeca redaktoro li rifuzis diri la nomon de la verkinto.

En la dek unuaj kongresoj de la unua Internacio, fondita en 1889 en Parizo, li estis unu el la plej distingaj figuroj. Li estis opozicianto, ĉar laŭ li la vojo de la parlamentismo k aŭtoritata socialismo nepre devas gvidi al reformismo k senfortigi la laboristojn.

Li verkis libron „Bankroto de la Marksismo", en kiu li atakas ĉiun ajn ŝtaton. Kiam socialistoj prenos la ŝtataparaton, ankaŭ ili nur povos regi per la subpremado al la amaso. „Ĉiu stato prenas politike k ekonomie la plej grandan potencon super la homo". Jam en la kongresoj de 1891 en Bruselo k 1893 en Zuriko li defendis „ĝeneralan strikon" kontraŭ eventuala mobilizo. Tiutempe oni nomis tion „ĝenerala sensencaĵo". Nuntempe la socialistaj internacioj transprenis ĉi tiun „sensencaĵon".

La batalo inter la liberanaj k ŝtatanaj socialistoj pli k pli akriĝis k finfine la skismo estis fakto. La devizo estis: for la kapitalo, eklezioj k kazernoj, for la ŝtato. La alia tendenco deklaris, ke religio k militismo estas privataferoj.

Ĝis la morto Domela Nivenhuis restis anarkisto. Grandegan pioniran laboron li faris. Kvardek jarojn li redaktis la gazeton, unue nomitan „Rajto por Ĉiuj" k poste „Libera Socialisto". Minimume dufoje semajne li oratoris. Pli ol cent librojn aŭ broŝurojn li skribis. Ĉefverkoj estas: *Historio pri la socialismo, De kristano ĝis anarkisto, La Parlamentismo, Bankroto de la Marksismo, Kompendio de la Liberpensulo, La socialismo en danĝero,* ktp. Multe ankaŭ laboris la iama predikisto en la liberpensul-movado.

En 1904 li kunvokis la unuan internacian kontraŭ-militistan kongreson en Amsterdamon, kie i. a. estis reprezentataj 116 000 anglaj ministoj k 100 000 organizitaj hispanaj metiistoj. Estis fondita Internacio de kontraŭ-militistoj. En 1907 okazis la dua kongreso, kiun i. a. partoprenis Ema Goldman, Eriko Malatesta, Luigi Fabri, Marmand k Petro Ramus.



Statuo al Nivenhuis

La fondita internacio fakte nur vivis en Holando, kie ĝi forte laboris k laboras. En 1917 tamen la holanda sekcio denove komencis labori por fondi internacion k en 1920 en Berlino la „Internacia Kontraŭmilitista Oficejo" estis fondita, kiu ĝis nun

bone k sukcese laboras. Ĉi tiu internacio estas rezulto de senlaca laboro de Domela Nivenhuis. Multe li suferis pro sia idealo, sed neniam li perdis la kuraĝon.

Lia vivo montras la kontraŭon kun la vivo de multaj aliaj gvidistoj. Li, veninte el la malamika klaso, donis ĉion en la batalo: monon k forton, k tre malriĉa li mortis la 18-an de novembro 1919. La tago, en kiu li estis cindrigata, montris, kiel la laboristoj honoris lin. Dek miloj ĉeestis en la stratoj de Amsterdamo. Mortis homo, kiu donis ĉion en la liberigbatalo, ĉion por sia idealo.

Sur granda placo en Amsterdama popolkvartalo la laboristoj starigis statuon, 17 metrojn altan, memore al la granda pioniro por la socialismo. Sur ĝi troviĝas lia parolo: *Mi pereu, se tio utilas!*

V. Vesels (12 721).

La situacio de l'ŝtatlaboristoj en Francio

Kiel multaj ŝtatoj, nia tielnomata bela Francio suferas pro buĝetaj doloroj ĉe la kaso; en ĉi tiu mankas nur ĉirkaŭe 12 miliardoj. Sed, feliĉe, ĉe la lastaj voĉdonoj, ni sukcesis havigi al ni maldekstran registaron gvidatan de honesta, sincera k lojala s-ro Erjo (Herriot). Tiuj epitetoj estas nepre aldonotaj, kiam hazarde, kara leganto, vi citos la faman nomon de nia pipfumanta ĉefministro.

Do, tuj post la balotado ni ĝoje frotis niajn manojn unu kontraŭ la alian k tute trankvile atendis la novan politikon starigitan de nia radikala registaro. Sed, baldaŭ, leginte la buĝetprojekton, mire ni konstatis, ke ĝi estis tute konforma al la dekstra politiko de la antaŭa registaro. Hodiaŭ mi volas raporti nur pri la ĉapitro rilatanta al la ŝtatlaboristoj, kiu vekis grandan protestmovadon. Por ricevi la mankantan monon, interalie, oni intencas malpliigi la ŝtatoficistajn salajrojn. La plano estas jena: ĝis 12 mil francaj frankoj netuŝataj estas la salajroj; pli altaj malpliiĝas progresie de 3% ĝis 10%. Krome la specialaj krompagoj en urboj, kiuj iel kompensas la pli karan vivkoston, estas malpliigataj je 20%. Ni aldonu, ke la aĝo de finservo por la instruistoj estas plialtigata de 55 jaroj ĝis 60 jaroj. Krom tio, pro ekonomio, oni fermis vilaĝajn lernejojn, ne konsiderante, ke la instruado estas leĝe trudata al la infanoj k monpunataj estas gepatroj, kiuj ne sendas siajn infanojn al la lernejo (fermita!).

Se oni pensas, ke antaŭ la voĉdono ĉiuj nunaj ministroj, aŭ preskaŭ ĉiuj, promesis ne fari tion, kion ili faris tuj post sia alveno ĉe la registaro, oni facile komprenos, kial mi insiste komence aludis pri la epitetoj laŭdantaj Erjo (antaŭ ĉiuj oni metu nian tiom utilan prefikson „mal").

Sed eĉ io malbona kelkfoje utilas. Tia estas nun la okazo. Ĉe minaco de la registaro la ŝtatlaboristaro entute leviĝis, kiu ajn estu la tendenco. Ambaŭ konfederacioj sindikataj, „reformista" k „revolucia", alvokis al manifestacioj surstrataj k mirige respondis la membroj. Neniam en Francio oni konstatis tian batalemon ĉe korporacioj, kiuj tre malfacile konsentas utiligi protestrimedojn radikalajn. Kutime la gvidantoj vizitas la ministrejojn, la parlamentanojn k tiel sukcesas ricevi kelkajn rezultetojn, kiuj kontentigas la membrojn. Kaj same agas la „revoluciaj" sindikatoj (C.G.T.U.) kiel la „reformistaj" (C.G.T.). Sed nune, pro la registara vipado, kun granda plezuro ni konstatis iun ŝanĝon ĉe la starpunkto de la plej malagemaj korporacioj, inter kiuj la ĉefa estas la instrulaborularo. Alia bona rezulto de tiu registara minaco estas starigo en multaj lokoj de komunaj kunvenoj k manifes-

La granda ribelo de l'Ljonaj (Lyon=aj) silklaboristoj en 1831

(Fino. Vd. antaŭan n-ron.)

Petskribo, subskribita de 4000 laboristoj, estis sendita al la parlamento, postulanta la restarigon de l'metia tribunalo funkciinta dum Napoleona regado. La stilo de tiu petskribo estis simpla, sed la teksto pruvis, ke la laboristoj jam konsciis pri nejusto en la socio, ĉar ili firme atakis siajn mastrojn.

Historiisto Monfalkon (Monfalcon) rimarkas prave: „La granda movado de 1830 havis, sur nian laboristaron, grandan moralan influon. Ĝi tiris ĝin el kutima apatio, konsciigis ĝin al ideo pri sia propra forto k siaj rajtoj: ĝi emancipis ĝin komplete. De tiam, liberemaj pensoj eniris la hejmojn k la laborejojn; oni parolis pri publikaj aferoj. La postaj okazantaĵoj trovis grandan parton de la laboristoj jam organizitaj en *politikaj asocioj*".

Kaj en 1930, senatano Justeno Godar (Godart), en verketo pri „la Revolucio de 1830 en Ljono", diris: „Al la tri „gloraj" tagoj de julio 1830 baldaŭ devis sekvi la tri „malgajaj" de novembro 1831, kie ribeliĝis, pro la tarifo k por sia pano, la silklaboristoj grupigitaj sub la nigra standardo portanta kiel devizon: Vivi laborante aŭ morti batalante! La instruo de 1830 estis perdita por la burĝaro, kiu pensante nur pri politiko, ne sentis, ke por la laboristoj, *la libero sen la socia justo estas nenio.*"

En 1831, leĝo de l'26a de marto pliigis la impostojn. La prefekto skribas al financa ministro, ke la laboristoj devas pagi la trioblon, eĉ la kvinoblon de antaŭaj impostoj. Pliigo de tiuj impostoj estis konsekvenco de la malpliigo konsentita al sud-francianoj, ĉar la registaro malpliigis la impostojn sur vinoj k alkoholo.

Kaj samtempe la mastroj malpliigis la salajrojn pro nesufiĉa vendado. Dekmiloj da laboristoj protestis k ili decidis sin turni al la prefekto por esti protektataj k helpataj. Ili decidis postuli la publikigon de tarifo deviga por la fabrikantoj k pro tio viziti la prefekton, barono Buvje du Molar (Bouvier du Molart).

La 8an de oktobro 1831 okazis la unua kunveno de la laboristoj, en kiu ili unuanime decidis postuli la nepran plialtigon de la salajroj.

La 10an de oktobro, en la dua kunveno, oni elektas plenumkomisionon, kiu verkis k sendis leteron al la prefekto. La esprimoj estas tre mildaj, ĉar oni esperas bonfaremon de la magistrato.

La 21an de oktobro, antaŭ Molar devis okazi miksa kunveno el laboristoj k mastroj; ĉiu partio havas 24 delegitojn. Sed la mastroj ne venis.

Alia kunveno okazis la 25an de oktobro k daŭris 4 horojn. La mastroj ĉeestis; la kunveno akceptis la salajrojn laŭ la tarifo de la laboristoj prilaborita.

Prefekto Buvje du Molar k la urbestro subskribis la kontrakton la 26an de oktobro 1831 k ĝi devis validi depost la 1-a de novembro. Kelkaj fabrikistoj eĉ konsentis pagi la laboristojn laŭ la nova tarifo jam de ĵaŭdo 27a, vendredo 28a k sabato 29a de oktobro, sed la granda plimulto de la entreprenistoj ne emis akcepti la novan staton. Jam fine de la semajno, fabrikistoj minacis fermi siajn magazenojn „por devigi la laboristojn fari kelkajn cedojn". La batalo estis prokrastita, sed ĝi devis eksplodi.

Tuj post la traktado de l'tarifo, la fabrikistoj sendis proteston al la parlamento.

La 22an de oktobro, jam granda amaso da silklaboristoj kunvenis en „Flavruĝa Kruco" (Croix-Rousse), antaŭurbo de Ljono; la prefekto postulis soldatojn k la generalo rifuzis. En Ljono estis 1800 soldatoj k 10 000 membroj de la „nacia gvardio", kies 3/4 estis laboristoj. Sed la konflikto inter civila k armea potencoj ne daŭris,

tacioj inter la du sindikataj organizoj supre menciitaj.

Por citi lokan ekzemplon, en Ljono (Lyon) 2000 ŝtatlaboristoj manifestaciis surstrate, la revolucianoj marŝis ĉe la fino de la longa vicaro k kantis la Internacion, dum la aliaj mute marŝadis. Oni ankaŭ aŭdis fiajn kantojn kontraŭ Erjo, kio mirigis la pasantojn, kiuj ne kutimis aŭdi tion en urbo, kies urbestro estas Erjo k kie li ĝuas favoran famon.

Spite la eble troa longo de tiu letero mi tamen devas noti alian karakterizan detalon pri la ŝtatlaboristaj sindikatoj aŭ pli ĝuste pri la instruistaj. Oni starigis referendumon, por ke la membroj diru, kiajn rimedojn ili estas pretaj apliki por rezisti je salajra malpliigo; al serio da demandoj la membroj devas respondi: jes aŭ ne (sur tabelo). La rimedoj proponataj iras de striko ĝis tute malgravaj protestoj. Sur la tabelo de mia sekcio mi konstatis, ke ĉiuj rifuzis la strikon k multaj eĉ rifuzis unuhoran ĉesigon de la laboro. Ĉiuj aliaj rimedoj kiel eksiĝo de la delegitoj ĉe diversaj komisionoj estis akceptataj. La konkludo estas, ke la instruistoj estas ĝenerale timemaj k tio des pli, ju pli alte ili staras sur la gradoj de instruo. Ni ankaŭ notu, ke el la ŝtatlaboristoj la plej kuraĝaj k agemaj estas la poŝtistoj (en Francio poŝto estas ŝtata servo).

Cetere, supozante, ke la instruistoj strikadus, kia estus la reago de la privataj laboristoj? La gazetaro jam de pluraj jaroj ĉiel klopodas, por ke la privataj laboristoj malestimu la ŝtatajn. Kaj iel ĝi sukcesis. La situacio nun estas tia, ke la gvidantoj de ĉiuj sindikatoj subtenas nian protestmovadon, dum el la sindikatanoj multaj opinias, ke tute prave oni malpliigas niajn salajrojn. Kaj se la instruistoj ne laboras, la infanoj devos resti surstrate aŭ hejme, kio certe ne kontentigos la gepatrojn. Pro tio oni povas opinii, ke la striko de instruistoj ne estas taŭga rimedo, ĉar ĉefe la aliaj laboristoj suferos pro ĝi.

Ni poste raportos pri la rezulto de tiu amasa agado unuafoje okazanta ĉe franciaj ŝtatlaboristoj. *K. Ru (835).*

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

En *Germanio* la generalo *Ŝlajĥer* (Schleicher) estas nomita kanceliero. En la *parlamentejo* okazis korpa batalo inter komunistaj k naci-socialistaj deputitoj. — Malkonkordo en la interno de l' nacisocialista partio sekvigis la eksiĝon de *G. Straser* (Strasser) el gvidposteno.

En *Belgio* la socialdemokratoj gajnis ĉe la parlament-elektoj 3 sidlokojn (ili havas nun 73 anstataŭ 70 en 1929); la komunistoj gajnis 2 (ili havas nun 3 anst. 1). Liberaluloj k flandraj naciistoj perdis profite al la katolikoj.

Inter la *franca* k *soveta* registaroj estas subskribita *kontrakto pri reciproka ne-atako*, per kiu la kontraktantoj sin ligas i. a. sin deteni de ĉiu agitado, propagando, kiu celus difekti la teritorian tuton de l' alia aŭ transformi perforte la politikan aŭ socian reĝimon.

La *soveta registaro* per dekreto transdonis la kontrolon pri la nutrado de l' laboristoj al la direktoroj de l' fabrikoj k a. gravaj entreprenoj. kiuj lastaj tiel fariĝas estroj super la lab. kooperativoj.

Per granda ofensivo la *japanoj* dispelis en Manĉurio la ĉinajn „ribel“-armeojn, senĝene malatentante la decidojn de la Ligo de Nacioj.

La *malarmado konferenco* en Ĝenevo stagnas. Germanio konsentis denove partopreni ties laborojn post promesoj pri rajto je armado.

En *Brazilio* per dekreto de l' prezidanto estas malpermesita la plantado de kafo dum tri jaroj, pro tio ke 18 milionoj da sakoj estas stokitaj k la nova rikolto superas la antaŭviditan eksporton.

En *Lvov* k aliaj poliaj urboj okazis gravaj antisemitaj ekscesoj, elvokitaj de naciistaj studentoj.

La kabineto Erjo (Herriot) en *Francio* estas renversita pro la problemo de l' ŝuldopago de l'15. decembro al Usono. — La ekssocialisto *P. Bonkur* (Boncour) sukcesis formi novan kabineton sur la sama bazo kiel la antaŭa.

ĉar la momento postulis rigorajn rimedojn por „savi la ordon“.

Dimanĉon, la 20an de novembro, sur placo de antaŭurbo *Flavruĝa Kruco* okazis granda manifestacio. Estis decidite ĉesigi la laboron tuj la morgaŭon k postuli la respekton al la nova tarifo, k tiucele veni en la urbon. La administracio, gvidata de la prefekto k urbestroj de Ljono k Flavruĝa Kruco decidis malpermesi la amasan eniron de la laboristoj en la urbo. La unua legio de l'nacia gvardio, kiu konsistis ĉefe el mastroj, okupis la kvin pordojn, tra kiuj pasis la vojoj de Flavruĝa Kruco al Ljono, la 21an de novembro, je la unua matene.

La unua kunpuŝiĝo inter nacia gvardio k laboristoj okazis apud la Granda Montvojo (Grand' Cote). La soldatoj pafis k mortigis laboristojn, sed ĉi-lastaj estis bone armitaj k ili venkis. Pli malsupre, proksime de la urbdomo, barikadoj estas konstruitaj k la batalo estas vigla. La laboristoj triumfas k ili kaptas la prefekton k la generalon, komandanto de l'nacia gvardio.

La 22an de novembro, la laboristoj, bone armitaj, flirtigis la nigran standardon kun surskribo: „VIVI LABORANTE, Aŭ MORTI BATALANTE“. La pafado estas terura, la kugloj trafas pli k pli da homoj. Matene, laboristoj de Gujlotjer (Guillotière) k Broto (Brotteaux) venas per Sentfua (Ste-Foy), Sentĵust (St-Just) k ponto de Senramber (St-Rambert) al Flavruĝa Kruco por helpi siajn kamaradojn. Nur la 23an de novembro, je la 7a vespere, la batalo finiĝis per kompleta venko de laboristaro. La bilanco de tiuj ribelaj tagoj estis jena: pli ol 1000 laboristoj estis mortigitaj per la kugloj k kanonpafoj de la ŝtata armeo. Sed pruvo, ke la laboristoj estis zorgemaj pri alies propraĵo. estas ke nur tri magazenoj estis detruitaj, k ne de ili. Super la venkintaj laboristoj flirtis la flago. „Panon laborante, morton batalante.“ Vespere, la prefekto decidis fortiri la soldatojn k ilin loki apud Ljono; li agnoskis la venkon de la laboristoj.

Bedaŭrinde, la Ljonaj silklaboristoj, kiuj batalante kontraŭ mastroj k registaro elmontris valoran klasan senton, tro fidis al la lojalo de la prefekto k de la mastroj venkitaj. La tempo pasis k rapide la situacio fariĝis denove sama, kiel antaŭ la novembra ribelo. La ĉefa punkto de la tarifo, t.e. la rifuzo de la ĉiutaga 25-centima malpliigo de la salajroj projektita de la mastroj, baldaŭ estis forlasata.

La registaro severe agis rilate la laboristojn: 60 gvidantoj de la ribelo estis malliberigataj k kondamnataj; 10 000 laboristoj estis pelataj el la urbo, ĉar laboro al ili ne estis konsentita.

Sociologoj k historiistoj de la socialisma movado multon verkis pri la ribelo de novembro 1831. Menciinda estas la komento de l'burĝa „Debatĵurnalo“ (Journal des Débats): La ribelo de Ljono malkovris gravan sekreton, tiun de *la batalo inter posedantularo k senhavularo.*“ La kapitalistoj bone komprenis la gravan karakteron de tiu movado, kiu ne estis idea, kiel la Granda Revolucio de 1789 k la Revolucio de 1830, sed profunde socia.

La Ljonaj laboristoj ne ribelis por akiri malgrandajn politikajn rajtojn, kiel la voĉdonrajton; ili faris revolucion pro salajroj k ne hezitis ataki la mastrojn k la registaron per armiloj. Tiu movado estis la unua en la laborista historio, kiu montras, ke proletoj organiziĝis por defendi siajn salajrojn k por akiri ties plialtigon.

La francaj laboristoj profitis el tiu revolucio k 40 jarojn poste, la Parizaj komunanoj pli vigle staris kontraŭ burĝa registaro. Bedaŭrinde, la Komuno ne sukcesis, sed tiaj ekzemploj k oferoj ne estas vanaj: ili ĉiam ricevas venĝon k kompenson. En 1917, la oktobra rusa revolucio venĝis la kuraĝajn mortintojn de 1831 k 1871.

M. Ru (Roux), 132.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esper.-devenaj!

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

El la Internacio

La venonta mondkongreso liberpensula okazos laŭ decido de l'plenuma komitato de l'Internacia Liberpensula Unuiĝo (IFU) en Hispanio. La diversaj sekcioj estas alvokataj jam nun zorgi, ke okazu multnombraj delegoj. — Ĉefpunktoj de la tagordo estos:

1) La ĝenerala politika situacio,
2) La kulturpolitika reakcio,
3) Socipolitikaj tendencoj de l'eklezioj,
4) La ideologia atako de l'reakcio k la aparta tasko de l'IFU.

Krome estas projektita kontraŭmilita manifestacio. Rilate al la apartaj cirkonstancoj en Hispanio ankaŭ la lernejproblemo estas pritraktota.

Internacia korespondado inter liberpensul-infanoj ekfunkciis. Kiu volas partopreni, estas petata, sendi sciigojn pri adreso, aĝo, lernejo, dezirata korespond-lingvo k -lando al

Kultursekretariat des Deutschen Freidenker Verbandes, Berlin SW 29, Gneisenaustrasse 41.

El diversaj landoj

Germanio:

Post kiam la germana registaro en majo 1932 malpermesis la komunistan liberpensulan unuiĝon, la reakciuloj klopodegas pereigi la tutan germanan liberpensulan movadon. — Antaŭ nelonge la ĉefkomitato de l'prusia parlamento akceptis proponon de la naciistoj, kiu postulas la malpermeson al la Germana Liberpensula Unuiĝo (kun pli ol 600 000 membroj!).

Sed la liberpensula movado ankoraŭ vivas! — La nombroj de l'eksiĝoj el la eklezioj ĉiam kreskas. Dum la jaro 1931 eksiĝis sole en Berlin 79 274 homoj kompare kun 66 635 en la antaŭa jaro. Tio signifas kreskon je proksimume 19%. Perdis la protestantoj 71 102, la katolikoj 7450, la judoj 722 adeptojn. — En Essen okazis, kiel respondo al la tie okazinta katolika jarkunveno, impona kulturtago de la liberpensularo en Rejnlando k Vestfalio. Grandioza manifestacio atestis la batalemon k oferemon de l' proletaro malgraŭ mizero k ĉikano.

Hispanio:

Antaŭ nelonge la registaro forpelis la kardinalon Segura pro respublikmalamika propagando. La papo nun investis kiel posteulon la episkopon de Oviedo, Luis i Perez. — Ruza artifiko! Perez estas la fondinto de unu katolika sindikato k subtenis en 1922 dum la granda minista striko la laboristojn, haviginte manĝaĵojn al iliaj infanoj. Tiele li laŭdire ricevis la alnomon „socia episkopo". — La katolika eklezio ĉiam bone akomodiĝas!

Britio:

„The Catholic Directory" (La Katolika Informilo) raportas, ke en la jaro 1931 eniris la katolikan eklezion de Anglio k Skotlando 11 980 konvertitoj. — 46 novaj preĝejoj k kapeloj estas malfermitaj, do preskaŭ ĉiusemajne unu. Tiele nun ekzistas sume 2274 katolikaj preĝejoj. — Ok novaj katolikaj mezlernejoj estas malfermitaj, nun ili nombras 519. — La nombro de la elementaj lernejoj plialtiĝis je 20 al 1331. — La nombro de l' katolika popolo kreskis en la lastaj 12 monatoj je 28 993 al 2 235 237.

Kompiltradukis laŭ „Ateisto", „Liberpensulo" k „Fajrero" 11 761.

Meksikio:

La papo antaŭ nelonge publikigis novan enciklikon, en kiu li akre atakas la meksikian registaron pro la tieaj „kristan"-persekutoj. Ne tre longe post la publikigo de tiu ĉi encikliko la meksika registaro ekzilis la ĉefepiskopon Rus i Florez (Ruiz y Flores) pro tiu encikliko k lia konduto kontraŭ la registaro.

Unu el la ĉefaj kaŭzoj por la encikliko estis la leĝaro de Meksikio k de ĝiaj subŝtatoj kontraŭ la katolika eklezio. 13 subŝtatoj k la federacia teritorio dekretis leĝojn pri la nombro de l' pastroj, al kiuj estos permesate praktiki diservon. Ĉiu meksikia subŝtato laŭ la konstitucio havas la rajton fari tion.

Plej energie procedis *Tabasko*, kies gubernatoro Kamaval estas „fikonata persekutisto al kristanoj". Depost 1924 tie validas leĝo, laŭ kiu povas praktiki diservon nur edziĝinta pastro. Nur unu sola pastro ekzistas en tiu ĉi subŝtato kun 224 000 loĝantoj. *Malsupra Kalifornio* permesas 2 pastrojn por 60 000 loĝantoj, *Ĵiapas* (Chiapas) 1 por 60 000. La federacia teritorio *Meksiko* inkluzive Meksikurbo havas 25 pastrojn, t. e. 1 por 43 200 loĝantoj. *Jukatan* k *Ĵihuaha* (360 000 k 440 000 loĝantoj) permesas 1 pastron por 40 000 homoj. „Iagrade funkcianta pastrumo" estas ebla nur en *Aguas Kaliente;* tie ekzistas 22 pastroj por 110 000 loĝantoj. En tuta Meksikio kun pli ol 8 milionoj da loĝantoj funkcias 314 pastroj.

La katolika gazeto, el kiu mi ĉerpas ĉi tiujn informojn, finas: „Nenia provo de la meksikia registaro pravigi sin povas kaŝi la brutan pruvon pri la senkultureco de tia bandita regado!" Nu, fakte la meksikia registaro ne havas kaŭzon timi la riproĉon pri senkultureco. Kion ĝi faris, ja estas nur la unua paŝo por ebligi konstruadon de vera kulturo baziĝanta sur libera memdecido de la homoj.

16 900.

Liberpensula fakkunsido en Ŝtutgarto

Faktoj: Bedaŭrinde nur partoprenis germanoj. La pritraktoj estis nur unuflankaj, ĉar mankis sugestoj el aliaj landoj.

Kialoj: Ke la granda plimulto de l' kongresintoj, do ankaŭ de l'liberpensuloj, en Ŝtutgarto memkompreneble estis el Germanio, ke samtempe kun nia liberpensula fakkunsido okazis ankaŭ anarkista, tio ne senkulpigas la absolutan mankon de l'alilandanoj. — Ĉu la liberpensulaj SAT-anoj en Germanio estas pli aktivaj ol en aliaj landoj?

Taskoj: La liberpensulaj SAT-anoj en aliaj landoj pruvu la malon! — Estontaj OKK-oj zorgu, ke ne okazu paralelkunvenoj!

Arbarulo.

ĈU VI JAM ANTAŬMENDIS

laŭ speciala tarifo (1 ekz. 0.30 mk. g., 5 ekz. 1.— mk., 10 ekz. 1.80 mk., 20 ekz. 3.30 mk. — ĉiu plia deko 1.50 mk.) kvanton el la

400-a NUMERO de „S-ULO" ?

SE NE, do ne prokrastu fari vian mendon. Tiu n-ro estos 16-paĝa, dukolora, bele ilustrita, sekve speciale taŭga kiel varbnumero *k facile disvastigebla!*

Mendojn akceptas Administrejo de SAT, *Kolmstr. 1,* Leipzig O.27.

TRA ESPERANTIO

AL LA TUTA MEMBRARO!

Grava novaĵo: Nova tarifo por aktivaj membroj!

Pro la longdaŭra k profunda ekonomia krizo, kies fino ne estas videbla, k kiu senlaborigis tre multajn esperantistajn laboristojn en la tuta mondo, ni decidis – neniun ŝanĝon tio alportas en la Statuto! – *plifaciligi la aktivan membriĝon* ĉe SAT. Al K-doj trafitaj de la krizo estos eble, laŭ la nova tarifo, kiun ni publikigas ĉi-sube, k kiu validos *ekde januaro 1933*, esti (resti aŭ iĝi) aktivaj membroj. Nome, eksterordinare malaltigante la kotizon por aktivaj membroj, ni liveros al la K-doj, pagontaj laŭ tiu tarifo, *ĉiumonate unu numeron 8-paĝan*, kiu inkluzivos „La Lernanto"-n k kiu enhavos kiel oficiala organo ĉiujn utilajn informojn pri la asocia vivo k ĝenerale pri okazaĵoj en la laborista esperanta movado. Laŭ tiu aranĝo la Gek-doj, kiuj profitos tiun ĉi tarifon, havos laŭstatute la rajtojn de aktivaj membroj!

La *ĝisnuna kotizo* por aktiva membreco tamen restas *neŝanĝita* por tiuj K-doj, kiuj deziras ricevi la kompletan gazeton (t. e. ĉiumonate 24 paĝojn). Same restas neŝanĝitaj la kotizoj por *aspirantaj* k *subtenantaj* membroj. Ĉiuj membro-kategorioj senescepte havas rajton ricevi la *Jarlibron.*

La gazeto do aperos de nun duparte k duonmonate: La Eldono A konsistos el numero 16-paĝa (monata), kiun ricevos nur la K-doj, kiuj pagos laŭ la *ĝisnuna tarifo* por aktivaj membroj; la **Eldono B** (oficiala organo) estos 8-paĝa, monata, k ĝin ricevos ĉiuj aktivaj membroj senescepte: tiuj, kiuj pagas laŭ la nova k tiuj, kiuj pagas laŭ la malnova tarifo.

Ni havas la konvinkon, ke tiu novaranĝo kontentigos ĉiujn k ĝojigos precipe tiujn multnombrajn K-dojn, kiuj pro mizerstato ne povante pagi por la kompleta gazeto, tamen deziras aparteni al sia tutmonda organizo k havi en ĝi egalrajtan lokon kun tiuj, kiuj pro pli favoraj cirkonstancoj povas pagi la pli altan sumon.

Ni direktas samtempe al ĉiuj K-doj, kiuj iel kapablas fari tion, la insistan peton helpi plue al la eldonado de ampleksa k bonimpresa *Sennaciulo* per pago de la *ĝisnuna kotizo* por aktiva membreco! Nur se tiu peto estos plenumita, se la rikoltado de la K-daro tra la mondo donos fruktojn, SAT povos plenumi ankaŭ en nova krizojaro sian gravan taskon en la servo de la proletaro... ĉar forta k ampleksa gazeto estas la plej efika k necesa batalilo de kiu ajn organizo.

Antaŭen por multmembra SAT k multe abonata „S-ulo"!

Direkcio de SAT.

Tarifo por Aktiva Membreco

Landoj	kun „S-ulo" B	kun „S-ulo" A k B
Argentinio, pes.	3.50	7.–
Aŭstrio, ŝil.	6.50	13.–
Belgio, belg.	6.50	13.–
Britio, ŝil.	5.–	10.–
Ĉeĥoslovakio, kr.	30.–	60.–
Danio, kr.	5.–	10.–
Estonio, kr.	4.–	8.–
Finlando, mk.	45.–	90.–
Francio, fr.	20.–	40.–
Germanio, mk.	4.–	8.–
Hispanio, peset.	7.50	15.–
Hungario, peng.	5.–	10.–
Japanio, jen.	3.–	6.–
Jugoslavio, din.	55.–	110.–
Latvio, lat.	5.–	10.–
Litovio, lid.	9.–	18.–
Nederlando, guld.	2.50	5.–
Norvegio, kr.	5.–	10.–
Polio, zlot.	7.50	15.–
Portugalio, esk.	22.50	45.–
Svedio, kr.	5.–	10.–
Svisio, fr.	5.–	10.–
Usono, dol.	1.25	2.50

Ne cititaj landoj pagu laŭ la germania tarifo.

Altlernejo Laborista ĉe la SAT-kongresoj

Kiel la legantoj jam scias per nia komuniko en la n-ro 398, ni projektas starigi k funkciigi dumkongresan altlernejon. Publikigante la ĉi-suban tekston, interkonsente kun K-do *Neergaard*, kiu bonvolis preni sur sin ties organizadon k gvidadon, ni esperas, ke multaj kompetentuloj respondos pozitive, proponante siajn servojn, farante sugestojn k donante konsilojn. Ni varme alvokas al partopreno k subteno. *Direkcio de SAT.*

Unu el la ĉefaj taskoj de SAT estas la klerigado al siaj membroj k la starigo de kulturaj interrilatoj inter klaskonsciaj laboruloj el la tuta mondo.

DISKUTEJO:

Al la ĉagrenita patro germana

(Vd. artik. en la n-o 397)

Mi konstatas, ke vi fiaskis rilate la altlernejan edukon de viaj infanoj. Do, kial ĉagreniĝi pri tio? Mi opinias, ke tiurilate la plej multaj germanaj gepatroj fiaskis same kiel vi. Sed ili ne publikigis tion. Ne povas esti aliel. Kial? Estas la kulpo de la germana laborista klaso, kiu dum 1918 ŝanĝis nur la nomon de la ŝtata firmo, sed cetere lasis la regadon en la manoj de l'malnovaj reakciaj konservativuloj. Precipe en la altlernejaj fakoj oni preskaŭ ne provis ion ŝanĝi. „Ni volas kreski en la novan ŝtaton", oni diris. – Hodiaŭ, post 14 jaroj, la burĝaj reakciuloj triumfas. La malnova spirito pli k pli refortiĝas, infektante eĉ ĉiujn junajn homojn. La altlernejo restis la instrumento por eduki burĝojn, sed ne socialistojn. Socialist-tendencaj instruistoj estas eksigataj el la altlernejoj. La junaj homoj, kiuj vizitas tiujn lernejojn, neeviteble fremdiĝas pli k pli je la socialist-tendenca edukado gepatra. Por tion aliigi, ni devus forigi la tutan burĝan ŝtaton k starigi la socialisman senklasan ŝtaton. Alia rimedo ne ekzistas.

Ĉu ni risku tion? Jes; sed ni devas scii, ke per parlamentoj tio ne eblas. La vojo de l'reformoj ankaŭ kondukis al fiasko. Por detrui la burĝan ŝtaton, la laborista klaso devas apliki senindulgan perforton. Libervole la burĝaro ne cedos. Vi atendas konsilojn: viciĝu ĉe la revoluciaj klasbatalantoj, por fine sukcesi forigi la burĝ-kapitalistan sistemon, kune kun la altlernejaj reakciuloj, kiuj venenas la sanan spiriton de viaj infanoj aparte k de la altlerneja junularo. *4660.*

Pri mia „malveremo"

La sekvantaj linioj estas la de ni mallongigita respondo al artikoleto de K-do 16 459 aperinta en la n-ro 397 de „S-ulo" sub la titolo: „Raportantoj, verku kiel eble plej objektive k vereme!" – Red.

K-do 16 459 iom intermiksas en sia „informo" du okazaĵojn, la aktualan pri batalvoko de du kom. parlamentanoj (ne tribun-vizitintoj!) dum parlamenta kunsido, k tiun el la jaro 1921 pri kontraŭmilitaj virinoj, kiuj el sur la tribuno kriis sian postulon. Mi ne hezitas resumi: Neniam okazis en holanda parlamento tia ago;* nur komunistoj – sufiĉe kuraĝe – faris tion k altiris la atenton de l'ĉeestantoj al la fakto, ke iuj parlamentanoj ne akceptas la nunan sociordon (la reĝino ja estas la unua reprezentanto de tiu sociordo!). Tiel komprenante la komunikon, K-do 16 459 ne havus motivon por denunci min kiel malvereman kunlaboranton, kies raportojn oni legas nur „kun ero da salo"!

P. G. v. d. Plank (16 794).

* Se mi raportus pri ĝi laŭ la kompartia „La Tribuno", mi certe ne estus objektive verema, kvankam tiu gazeto sola asertas scii precize la diritajn frazojn, dum *ĉiuj aliaj gazetoj* (ankaŭ socialdemokrataj) – laŭ „La Trib." – eraras!

Estas tre grave, ke laboristoj lernintaj esp-on povas profiti per tio en kiom eble plej granda amplekso por akiri sciojn, aplikeblajn en neesperantistaj rondoj. Ĝuste per praktika uzado de esp-o por kulturaj celoj ni plej bone konvinkas eksterestarantajn K-dojn, ke ni laboras racie por forigi la lingvajn privilegiojn, kiujn posedas la kleruloj de la nuna tempo. Esp-o kiel efektiva rimedo por laborista klerigado — jen tio, kio allogus skeptikulojn.

Okazis ĉiujare depost 1925 „Somera Universitato“ ĉe la burĝaj mondkongresoj esperantistaj. Ĝi trovis iom da sukceso malgraŭ tio, ke la lekcioj ofte estis pli malpli sensignifaj aŭ tro specialaj por veki ĝeneralan intereson (ekz. „Unuecigo k normigo en la termagneta scienco“ aŭ „Danĝeroj de Alpa montmigrado“).

Tamen, ĉar la ideo en si mem montriĝis bona, utilas nun provi, ĉu ni per iel simila — ne sama — aranĝo ĉe niaj SAT-kongresoj ne povas krei novan progresigan rimedon en nia kultura laboro. *Do, se ekzistas sufiĉe da intereso, ni intencas aranĝi altlernejon laboristan dum la SAT-kongresaj tagoj en Stokholmo!* Por atingi tion necesas trovi kelkajn K-dojn, kiuj kapablas fari aŭdindajn lekciojn. Ĉar oni petis min aranĝi tiun ĉi aferon, la K-doj povantaj plenumi la sekvantajn kondiĉojn, bonvolu skribi al mia malsupre indikita adreso.

Por ke la afero estu serioza, ni devas fari la sekvantajn postulojn:

A. Pri la *lekcionto:* 1) Ke li estu perfekta esperantisto. 2) Ke li estu fakisto — ne amatoro — koncerne al la temo lekciota (ekz. per absolvo de ekzameno ĉe universitato aŭ alia altlernejo).* Por havi almenaŭ iom da garantio pri la kapablo de la lekcionto, ni devas postuli tion, kvankam oni ofte vidas, ke lerta amatoro superas mallertan fakiston. 3) Ke li havu temon taŭgan por lekcio.

B. Pri la *lekcioj:* 1) La lekcioj estu preparite konformaj al la publiko, kiu devos aŭskulti ilin. Karakterizante tiun publikon, ke ĝi estas klaskonscia laboristaro speciale interesiĝanta pri sociaj aferoj, ni prefere devas akcepti sociologiajn temojn. Multaj problemoj, kiuj pro la nuna socisistemo k ties „moralo“ ne estas sufiĉe pritraktataj, estus same bonvenontaj por pritraktado. Mi mencias hazardajn ekzemplojn: la seksa problemo, psikanalizo. 2) La lekcioj estu rigardataj kiel *enkondukoj* en la koncernaj fakoj. (Ekz. estas konsilinde, ke la lekcianto i. a. donu koncizan bibliografion pri plej gravaj verkoj en la ĉeflingvoj, tiel ke interesiĝantoj poste facile povu daŭrigi studojn hejme.) 3) La lekcioj ne estu tro subtilaj, abstraktaj. 4) Ili estu prezentataj en klara, populara formo. 5) Ili ne estu tro specialaj, sed prefere *havu ian principan signifon por la evoluo de la individuo aŭ socio.*

Tiu ĉi ekspansio de nia peresperanta kulturlaboro sukcesos, se la SAT-anaro *aktive* interesiĝas.

Paul Neergaard (15 326), Kastélsvej 21, *Kopenhago.*

(Kiel fakisto: Licenciato de hortikulturo*.).

* Pri tiu punkto la opinioj povas esti diversaj k ni ŝatus aŭdi pri tio de la legantoj.

* Ĝardenkulturo.

Financa raporto de O. K. K. de la XII-a SAT-Kongreso en Ŝtutgart

Enspezoj	*mk. g.*
Kongreskotizoj	776.52
Subteno de urbo Ŝt.	150.–
Kolektlistoj	249.87
Organizoj, DMV. Ŝtutg.	10.–
Anoncoj (programo)	116.–
Enirmono (publ. kunvenoj)	114.50
Libroj ktp. (vendado)	114.01
Sumo:	1530.90
Elspezoj	*mk. g.*
Salono k ornamado	234.66
Programo k propagando	336.70
Insignoj	78.85
Muziko, kantado, kostumoj	279.–
Afranko	83.01
Ĝeneralaj elspezoj	335.30
Saldo	183.38
Sumo:	1530.90

La profitsaldo estas dividita je 2/3 por SAT k je 1/3 por la SAT-rondo en Ŝtutgart.

Ŝtutgart, 3. dec. 1932.

Fr. Steiner (4396).

La kason kontrolis k trovis en ordo: *Osk. Breddermann (2429), Hans Roth (17 447).*

La O.K.K. dankas al ĉiuj Gek-doj, kiuj subtenis ĝin per kolektlistoj k a.

ĈU VI VOLAS BATALI KONTRAŬ LA KAPITALISMO??

Tiam vi devas funde koni la teorion kontraŭkapitalisman! Nov-eldonota SAT-verko de Georgo Blumental:

„La liberigo de la mon- k interez-regado“

kies tradukon jam pretigis K-do Rik. Pfertner (Pförtner) helpas al vi en la batalo kontraŭ ekspluatado.
La prezo estas 1.50 mk. g. Antaŭmendu k -pagu por la verko ĉe la administrejo de SAT en Leipzig, por ke la baldaŭa apero estu certigita! !

Vi helpas per tio al vi mem k via batalo!

KOMUNIKO DE L'JUN. SEKCIO.

Enketo: Anoncis sin por la Sekcio ĝis nun jenaj K-doj: Ebermann, Meissen (Germanio); K-do 18 016, Belfort (Francio), interesiĝas pri la Ned. Sendep. Soc. Partio; R. Melo, Drancy (Francio); R. Krause, Leipzig.

Rondleteroj: K-do R. Melo, 30, rue du Chemin Vert, Drancy (Francio) estas preta gvidi leter-rondon pri jenaj temoj: Metodoj por kontraŭbatali la religiajn skolojn. — Ĉu la filozofaj skoloj povas faciligi nian laboron kontraŭ religiaro k kiuj? — Kia devas esti la senreligia edukado por la infanoj nun k en socialista socio? 2. por filatelistoj: Ĉu estus utile krei Labor. Asocion de Filatelistoj k helpe de esp-o?

Infan-interŝanĝo: Gek-doj Klaps, Karpfenseigen 12, Libera urbo Dancig, estas pretaj gastigi K-dinon ĝis 14 tagoj. Ili estas vegetaranoj; la tuta familio parolas esp-on. Aliflanke ili ŝatas sendi sian 4-jaran filinon al alilandaj esp-istaj gepatroj.

La red.: *Vetig, Gelnhausen.*

PRI FERIVIZITOJ

Pri tiu ĉi temo aperis 1) en „S-ulo“ n-ro 392 artikoleto de K-do Wiersma (17 527), kiu raportis pri propra sperto k instigis al tio, disponigi siajn hejmojn por gastigi eksterl. K-dojn; 2) en „S-ulo“ n-ro 397 artikoleto de K-do H. Rijpstra (15 547) kun riproĉoj al K-do Wiersma pri nekonsekvenceca konduto ktp. — K-do Wiersma nun „postulas nepran nuligon en „S-ulo“ pere de la Redakcio de la artikolo de K-do H. R.“ direktita kontraŭ lia persono. Ni sugestis al li verki rebaton aŭ klarig-artikolon; sed K-do Wiersma al ni respondis:

„... Mi ne intencas en „S-ulo“ rebati la riproĉon de samideano. Estas aĉe! Se *vi* ne povas arbitracii en *Parizo* pri iu afero en *Holando*, *mi* opinias, ke vi (ne sciante la aferon) *ne* rajtas (k ne estas honeste) enpresigi tiun artikolon *neveran* k *ne-sennaciecan.* Rilate al la artikolo, mi skribis leteron al H. R., sed ĝis hodiaŭ (t. e. 30. XI.) mi ricevis *nenian* respondon.“

Publikigante ĉi tiujn liniojn, ni esperas, ke K-do W. estos kontentigita; almenaŭ ni ne samopinias kiel li, ke ni ne devas aperigi ankaŭ riproĉojn ricevatajn kontraŭ K-doj, ĉar ni ja donas al la riproĉato la eblon sin pravigi en la gazeto! —

Pri la sama temo ni ricevis ankoraŭ artikolon de K-do Bernthaler (15 026) el Bottrop, kiu subtenas principe la iniciaton de K-do W. (flanke lasante la riproĉon kontraŭ ĉi tiu K-do): per senpaga anonco en „S-ulo“ inviti eksterl. Gek-dojn por gastigo. La anoncintaj K-doj devus promesi raporti en „S-ulo“ pri sukceso k rezulto. K-do 15 026 gastigis K-dojn el Suda Francio k Jugoslavio dum 8 k 5 tagoj. La lokaj Gek-doj tiuokaze estis tuj informataj k aranĝis specialajn kunvenojn. Precipe la nov-lernintojn kontentigis tiuj aranĝoj, kiujn ĉeestis eksterlandano, k ankoraŭ hodiaŭ ĉeestint-

aj ministoj memoras entuziasme pri ili. En lia regiono (Ruhr) estas esp. grupoj en preskaŭ ĉiuj urboj, sekve eksterlanda vizitado dezirindas k certe efike helpas ĉe la varbado. Kiu K-do aŭ K-dino emos venontjare viziti K-don 15 026 dum unu semajno? Skribu al li!

EN NIA MOVADO

KRONIKO

Germanio. Sub la moto „Antaŭen en la proletan amason de l'Ruhrregiono," okazis la 20. 11. distrikt-renkontiĝo en Boĥum, bonsukcesa dank' al la zorgado de l' loka grupo „Antaŭen". En la sindikata domo estis aranĝita modela esp. ekspocio, kiun vizitis dum 3 tagoj 640 p. Salutparolis en la konferenco K-do Zernikov; poste pritrakto de l' temo „La patriotismo k ni esp-istoj", k de organizaj, propagandaj k. c. aferoj. Partoprenis 96 Gekdoj. Ĉe vespera varbfesto kun kontraŭmilita tendenco kolektiĝis 480 p. Parolado: „Pri kio nin avertas la militviktimoj". Popolĥoro, „ruĝaj ribeluloj" k naturamikoj zorgis pri la muzika parto. Rezulto: 30 novaj lern. por la Boĥuma grupo (13 563). — Hispanio. *Gerona.* 50 geesp-istoj ekskursis dum sept. aŭtomobile k propagandis en proksima vilaĝego Kaza de la Selva (5000 loĝ., kork-industrio). Okazis strata manifestacio ĝis la magistratejo. Tie aplaŭdis la alvenantojn proks. mil pers. La vilaĝestraro bonvenigis la esp-istojn. Estis donata nomo de d-ro Zamenhof al strato en la vilaĝo. Sekvis festo ĉe Kultursocieto. Kurso kun 35 gejunuloj. (12 030.)

EKSTER NIA MOVADO

Iu sinjoro ektrovas Amerikon.

„Mi havas (la) honoron informi vin, ke mi — vidante indiferenton de la mondo rilate al la interlingva problemo, ĥaoson de neinterkonsentigeblaj opinioj, regantaj ĉe neesperantistaj interlingvistoj k danĝeron, kiun alportas al la ideo de lingvo artefarita la provoj de revivigado de la lingvo latina mezepoka — ĉesigas mian ĝisnunan agadon k senrezerve aliĝas al la esp-a movado.

Mi akceptas esp-on laŭfundamente k ne okupos min pri reformoj, kiuj detruas ĝisnunajn akiraĵojn de esp-o. En Universitato mi pritraktos nur esp-on k ne aludos aliajn sistemojn, ĉar tio povas kauzi konfuzon danĝeran por esp-o. — *Wieslaw Jezierski*, lektoro pri lingvo internacia en universitato."

*

En Koburg (Aŭstralio) en 1929 estis fondata Esp. klubo, kiu havas nun 35 anojn (15 laboristoj). En Melburno nun estas 9 kluboj, i. a. ĉe Amikoj de Sovetio, sume kun proks. 400 anoj. 200 pers. ĉeestis la 3-an datrevenan feston de la Koburga grupo. — *16 907.*

*

Ĉe la 1-a Helena Esp.-Kongreso (16/18. julio en Ateno) direktoro de l'ministerio por instruado paroladis en malferma kunsido favore al esp-o.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Die linke Front (La maldekstra fronto). Marksista revuo por kulturo k politiko, eldonata de l'Socialista studenta unuiĝo (esp. peranto: Ernst Thimm, Saalestr. 6, I, Berlin-Neukölln). N-ro 1.— 32 pĝ. Form. 16×22. Prezo: 0.20 mk. (Germanlingva).

Ni notas el la enkonduko jenon: „... Por ni la marksismo ne estas sumo el fiksaj tezoj, ne preta, dogma sistemo aŭ racie vestita profeta evangelio. Ni konceptas ĝin kiel teorian esprimon por la historiaj interesoj de l' reala klasmovado de l'proletaro, samtempe kiel teorion de l'proleta revolucio. ... La „L.F." estas superpartieca ..." La enhavo de tiu unua kajero estas interesa. Esp-istaj K-doj klopodas por starigi daŭran esperantan paĝon. Jen grava tasko plenumenda por la *Socialista Esp. Frakcio* k la ekstergerm. klasbatalaj studentoj esp-istaj!

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

L'Effort, Lyon, 26. 11., El Japanio.

Represis el „Unua Legolibro":

Voran, wir siegen! (pacista gazeto), okt., nov., 2 rakontoj.

Pri SAT reklamis:

La Patrie Humaine, Paris, 3. 12., *La Voix Libertaire*, Limoges, 3. 12.

Prisper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 17. 11., 1. 12., 8. 12., *Arbetaren*, Stokh., 10. 11., *Le Populaire*, Paris, 18. 11.

NIA POŜTO

16 970. — Via manuskr. aperos en „L. L.".

12 950. — Jes, ni akceptas „Postal Orders".

J. Metall. — „Bobinska, Pioniroj", neniam k nenie aperis broŝurforme. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso, simpla trilinia anonceto kostas 0,80 mk g., ĉiu plia linio 0,50 mk. g. — Grandaj anoncoj kun kadro: po kv. cm. kostas 0,20 mk. g.

AŬSTRIO

K-do Fr. Gay, XVI. Wurlitzergasse 38/15, *Wien*, iama militkaptito, kun sovetiaj K-doj el la regionoj: Moskvo, Kiev Simbirsk, Pensa k Kazan, pĉt. Resp. gar.

K-do Gustav Bernet, Hasnerstr. 144, 1/10, *Wien, XVI.*, serĉas seriozan koresp-adon kun nur sovetiaj K-doj.

BRITIO

Glasgova SAT-grupo aranĝos la 17. 1. ekspozicion. Bv. sendi L, PI, gaz., afiŝojn. Certe resp. Adr.: K-do E. Doran, 33 Carleston St., *Springburn-Glasgow.*

GERMANIO

Por plenaĝuloj, fraŭloj k Gek-doj el 3 kursoj, mi serĉas gekorespantojn en ĉl., L, PI, bfl. Skribu multnombre! Certe resp. Adr.: K-do Konrad Bernthaler, Horster Str. 496-a, *Bottrop/W.*

HISPANIO

Esp. rondeto koresp. pri kooperativa movado, kĉl. Resp. garantiata. Adr.: Kooperativo „La Sabadelleux", Str. des Planes 11, *Sabadell.*

HUNGARIO

K-do R. Farkas, Hajnal-u. 16, *Pècs*, dez. interŝ. ricevi A.B.C.-ĵurnalojn el Belgio k The Toronto SW el Britio. koresp. kĉl.

NEDERLANDO

Lab. Esp. Grupo en Hillegom organizos letervesperon k koresp. kĉl. Gek-doj. Skribu multnombre! Resp. gar. Adr.: K-do G. A. Spilker, *Hillegom.*

Grupeto de 4 esp-istinoj koresp. kĉl. Resp. gar. Skribu al: K-do E. Kool, Joden Breestr. 87/III., *Amsterdam C.*

K-do J. de Groot, Meeuwenlaan 309, *Amsterdam N.*, nur per PK. kĉl. Resp. garantiata.

SOVETIO

K-do G. V. *Sikora*, ul. Kooperativnaja 12, *Petropavlovskaja*, Sev. Kav. Kraj, Kurganskij rajon, dez. kor. kĉl, PM, PI, PK, L, esp-aĵoj.

K-do A. K. *Dalder*, kuracisto 25-jara, Poteŝnaja ul. 3, kv. 15, *Moskvo 61*, pri ĉt.

K-do N. Ponomareva, Staro-Poĉtovaja 86, *Rostov-Don*, kĉl., interŝ. il. gaz.

K-do A. *Ursin*, Bilikulskij sovhoz N. 93, *Aulie-Ata*, Kazakstan, pri foto, radio k. a. t.

K-do Joh. Pletuhin, Ispolkomskaja 18, C. 8, *Dnepropetrovsk*, kĉl, L, PK.

SVEDIO

K-dino Anna Johansson, Södra fjärstadgatan 4, Ratorp, *Karlstad*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI.

K-do Bertil Nilsson, Ransberg, *Ransäter*, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI, PM.

K-do E. Karlsson, Rädstwaggatan 1, *Nora*, kĉl, pri ĉ. t.

K-do K. J. B. Ekström, Storängen 4, *Boras*, serioze koresp., kĉl, L, PM. Certe resp. Pref. temoj: politikaj k kulturaj.

Nia klubo aranĝos fine de januaro 1933 letervesperon. Gek-doj el ĉ. landoj tuj skribu al jena adr.: Lab. Esperanto Klubo de Malmö, *Malmö.*

SVISIO

Lab. Esp. Grupo kolektive koresp. nur kun negermanlingvaj grupoj. Adr.: K-do H. Wirz, Kanzleistr. 102, *Zürich 4.*

USONO

K-do V. Varela, *Hugo*, Colo, kun Gek-doj el Sovetio k Japanio pri lab. movado k ateismo. Se iu K-do aŭ K-dino el Moskvo povus sendi al mi „La militanta ateismo" kontraŭ pago de SAT-libroj mi tre dankus.

Gekamaradoj tutmondaj!

Por nia migranta propagandkesto sendu al ni konvenajn esp-aĵojn. Ĉiu sendonto ricevos foton de la Skoghal-a Popoldomo. Helpu nin — Värmlanda distrikto de la Sveda LEA, Lunden 457, *Skoghall* (Svedio).

Salutleterojn k pk. sendu al nia festo, la 13. januaro 1933. — 30 komencantoj dez. korespondi kĉl. Nepre respondos grupo „Unueco". Adr.: K-do C. Sorensen, Lundsgaardsvej 41, Bolbro, *Odense* (Danio).

Korespondemaj Gekamaradoj!

Ni aranĝos letervesperon kun samtempa ekspozicio fine de januaro 1933. Tial ni petas ĉ. eksterl. Gek-dojn sendi al ni L, PK, PI k aliajn esp-aĵojn. Resp. garantiata. Adr.: Klubo Esperantista de Tramistaro, Elvsborgsgatan 11-a, *Göteborg* (Svedio).

Internacian letervesperon

aranĝos Esperantista Klubo de Falkenberg, meze de marto 1933. Leteroj, kartoj k a. sendaĵoj estas atendotaj el ĉ. partoj de la mondo. Indiku ĉu vi deziras respondon. Certan respondon garantias vigla sesdeknombra klubanaro. Adresu al:

Esperantoklubben, Box 40
Falkenberg (Svedio).

LETERVESPERON

aranĝos en la lasta semajno de februaro 1933 *La Anarkista Esperanto-Grupo de Stokholmo.* Gek-doj, sendu leterojn, salutojn k gazetojn multnombre! Adr.: K-do Folke Rosén, Helgagatan 36, 4. *Stokholmo 4.* (Svedio).

ENHAVO

	paĝo
Ĉu nacia aŭ socia egalrajteco?	37—38
Ferdinando Domela Nivenhuis	38—39
La situacio de l'ŝtatlaboristoj en Francio	39—40
La granda ribelo	39—40
Liberpensula Paĝo	41
Diskutejo	42
Tra Esperantio	42—44

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)